

# Eŭropa Bulteno

Aprilo 2012, Numero 115

## NIAJ LANDAJ MOVADOJ ESPERANTO EN LITOVIO

Semo de Esperanto ĵetita en la jaro 1887 trafis ankaŭ en Litovan teron. Ideo de la internacia lingvo travivis ondojn, malflusojn, ankaŭ persekutojn.

La unua litova esperantisto estis *Aleksandras Dambrauskas* (iam Dombrovski), en Zamenhofa Adresaro li estis 186a. En la jaro 1890 A. Dambrauskas mem verkis kaj eldonis la unuan E-lernolibron por litovoj. Tiutempe en Litovio carisma reĝimo estis malpermesinta presi librojn en la litova lingvo, do la lernolibro estis eldonita en eksterlando. Baldaŭ en grandaj urboj Vilno kaj Kaŭno fondiĝis E-societoj, estis eldonataj E-libroj kaj gazeto „Kovno-Esperanto“. Sed en tiuj societoj estis malmultaj litovoj, dominis rusoj, poloj, hebreoj.



Post la Unua Mondmilito en la jaro 1918 litovoj rekreis sendependan ŝtaton kaj jam en 1919 estis fondita Litova Esperanto-Asocio. En la jaro 1922 aperis monata E-gazeto „Litova Stelo“. Iniciatinto de la movado kaj ĝia gvidanto estis la sama A. Dambrauskas. En multaj lokoj fondiĝis grupetoj da esperantistoj. Sed en la jaro 1926 la situacio ŝanĝiĝis, estingiĝis „Litova Stelo“, malfluso daŭris 8 jarojn. Nova ondo leviĝis en 1935, la stirilon de la movado prenis novaj aktivuloj *B. Giedra*, *V. Butkus*, *P. Lapienė* kaj aliaj. En 1938 Litovio festis 20-jaran

jubileon de sendependa vivo. Estis eldonita speciala numero de „Litova Stelo”, kiu prezentis historian skizon de Litovio, priskribis progreson kaj sukcesojn de la lando dum 20 jaroj de sendependa vivo. La artikolo „Esperanto dum 20 jaroj en Litovujo” faris revuon de esperantista agado kaj menciis, ke en la tuta lando troviĝas 880 esperantistoj en 76 lokoj.

Tamen en la jaro 1940 Litovio estis okupita kaj aneksita, ĝi fariĝis parto de Sovetunio, kie E-movado estis malpermesita kaj persekutata. La movado kolapsis, ĉio estis detruita kaj devis pasi 16 jaroj ĝis kiam ĝi povis renoviĝi. Nur en la jaro 1956 la vorto *Esperanto* ĉesis esti tabua en Sovetio. Estis permesite ĉe sindikatoj organizi Esperanto-klubojn, instrui kaj lerni la lingvon. Ankaŭ en Litovio fondiĝis kluboj en Vilnius, Kaunas, Klaipėda, Šiauliai, Panevėžys kaj aliloke. Ekaktivis malnovaj esperantistoj A. Poška, J. Petrulis, A. Vaitilavičius, A. Vebeliūnas kaj aliaj. Oni sukcesis eldoni lernolibron, vortaron, kelkajn librojn.



En 1959 studentoj el Latvio, Litovio kaj Estonio organizis la unuan tendaron apud lago Baltezers (Latvio) kaj decidis, ke tiu kunflugo de esperantistoj (BET) okazu ĉiujare laŭvice en tiuj tri landoj. La tradicio vivas ĝis nun kaj pasintjare okazis jam BET-47 en Latvio. Ĉar Sovetiaj esperantistoj ne havis eblecon veturi eksterlanden kaj partopreni en UKoj, tiuj BEToj fariĝis kvazaŭ minikongresoj, en ili kolektiĝadis ĝis 400 kaj eĉ pli da esperantistoj el tuta Sovetio. Ankaŭ la programo estis simila: diversnivela E-kursoj,

Somera Universitato, amuzaj vesperoj, ekskursaj tagoj.



Nova periodo komenciĝis en la jaro 1988, kiam litovaj esperantistoj decidis refondi Litovan Esperanto-Asocion (dum lastaj jaroj de ekzistado de Sovetunio tio jam estis ebla). Ĝi baldaŭ aliĝis al UEA. Prezidanto de la refondita Asocio estis elektita Povilas Jegorovas, kiu gvidas ĝin ĝis nun. Pli vastaj horizontoj por esperantista agado en Litovio malfermiĝis post rekreo de sendependa Litova ŝtato en 1990. La Asocio ricevis propran domon sur strato Zamenhof en Kaunas. En 1991 renoviĝis eldonado de prestiĝa E-revuo „Litova Stelo“. Ĉiujare en Kaunas estas organizataj tradiciaj Zamenhofaj Tagoj. Okazadis senpagaj

E-kursoj, kiujn gvidis famaj E-instruistoj A. Andrade Alves, M. Bacev, Š. Špiguth, A. Zahariaš, T. Steele, E. Bondar. Ekde la jaro 1991 litovaj esperantistoj partoprenas jam en ĉiuj Universalaj Kongresoj de Esperanto, vizitas siajn amikojn en eksterlando. En Litovio okazis 65a SAT kongreso, 57a kongreso de IKUE. P. Jegorovas sukcesis ricevi ŝtatan subvencion kaj tio ebligis organizi kelkajn imponajn projektojn, el kiuj sendube elstaras la 90a Universala Kongreso de Esperanto en 2005 kaj Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en 2008. Krome estis eldonitaj multaj libroj en / pri Esperanto kaj L. Zamenhof.

Tamen la ekonomia krizo, skuinta la mondon, ne preteriris ankaŭ Litovion. Malgraŭ ĝi okazas ĉiuj tradiciaj aranĝoj, sed pli modeste, kun malpli da partoprenantoj. La Asocio perdis ejon en Vilnius, ankaŭ Esperanto-domo en Kaunas bezonas riparadon. Post 20-jara brilo sur Esperanta firmamento ĉesis lumi „Litova Stelo“. Tamen pri pli interesaj kaj aktualaj eventoj en Litovio, ankaŭ pri Esperanto-temoj oni povas legi en interreto kolore ilustritan blogon BARELO, kiun preparas A. Grincevičius (adreso: <http://barelo.blogspot.com/> ). Juna

poligloto G. Degésys gvidas E-kurson en Vilna universitato. Do oni povas esperi, ke la nuna malfluso estas provizora, post ĝi sekvos nova ondo. „Ideoj, se grandaj, ne mortas kiel homoj“ – diris litova poeto Maironis.

Petras Čeliaskas, iama redaktoro de Litova Stelo

## **NOVAĴOJ PRI EŬROPA KONFERENCO EN TRIESTO »KIA ESTUS LA NUNA EŬROPO SEN EU?«**

Restas nur kelkaj tagoj ĝis la okazigo de la grava eŭropa konferenco kiun organizas EEU kaj loke aranĝas Triesta Esperanto-Asocio. En la konferenco partoprenos du eksaj ŝtatsprezidantoj, unu eŭropa parlamentano, unu eksa eŭropa parlamentano, unu eksa ministro, unu itala parlamentano kaj aro da universitataj profesoroj. Venos organizitaj grupoj da studentoj el Universitatoj de Zagrebo, Zadar, Ljubljana, Graz, Bratislava kaj Triesto kaj aro da aliaj studentoj el entute 8 eŭropaj landoj. Partoprenos krome kvindek da esperantistoj el deko da landoj. Oni uzos tri laborlingvojn: la anglan, la italan kaj Esperanton kaj krome la eksaj ŝtatsprezidantoj parolos en la slovena, respektive kroata lingvoj. Interpretos profesiaj interpretistoj, pluraj tiusence konataj esperantistoj kiel Istvan Ertl, Michela Lipari, Marek Blahuš, Nikola Rašić...



Edvige Ackerman. LKK-prezidantino

Estos vere reprezenta festaranĝo okaze de la Tago de Eŭropo.

Aparte okazos Ronda Tablo por la ĝenerala publiko de Triesto kun 4 gravaj eksaj politikistoj: Milan Kučan, Stjepan Mesić, Gianni de Michelis kaj Thomas Jansen.

Zlatko Tišljar

## **LA JARO DE TIBOR SEKELJ**


### **A) APERIS EN SLOVENA KAJ KROATA VIKIPEDIOJ NACILINGVA ARTIKOLO PRI TIBOR SEKELJ**

Baze de la alvoko de EEU ni havas informon ke almenaŭ du nacilingvaj artikoloj pri Tibor Sekelj aperis en naciaj vikipedioj kiuj ne havis artikolon pri li. La artikoloj estas tradukoj el la esperanta artikolo. La slovenan tradukon faris Vinko Ošlak kaj la kroatan grupo de novlernantoj de Esperanto sub la gvido de Spomenka Štimec (Danira Grgec, Milka Đukić, Josip Kušec, Tihana Mikša, Davor Klobučar). La slovenan artikolon envikipediigis Arno Lagrange kaj la kroatan Davor Klobučar. Ni pluinventas esperantistoj ĉie tra la mondo sekvi tiujn ekzemplojn.

La menciitaj artikoloj troviĝas ĉe: [http://hr.wikipedia.org/wiki/Tibor\\_Sekelj](http://hr.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj) kaj ĉe [http://sl.wikipedia.org/wiki/Tibor\\_Sekelj](http://sl.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj).



## B) PREPARE AL LA KONFERENCO EN SUBOTICA: LA SERĈATA VIVFILOZOFIO – KIO ESTAS LA HOMO?



Studante la vivon de Tibor Sekelj kaj liajn verkojn oni rapide konsciiĝos pri tio ke Tibor dum siaj ekspedicioj diference de aliaj esploristoj ne serĉis materiajn trezorojn, novajn teritoriojn aŭ iujn sciencajn faktojn. Okazis ke li trovis ankaŭ tion, sed kiel flankan gajnon. Li estis ege scivolema homo sed ankaŭ pasia pacifisto kaj tial li efektive serĉis la homon. La esencon de la homo, la homan animon. Li volis konvinkiĝi kaj montri tion al ĉiuj ke la homoj esence estas samvaloraj kaj ke ne ekzistas iu ajn kaŭzo ke oni dividu la grupojn je kategorioj pro kiuj estas necesaj militoj. Li volis kontribui al tio ke laŭeble multaj, ĉefe la infanoj, komprenu ke ĉiu homo estas trezoro respektinda, valora

kaj grava, sekve neniu apartenas al grupo kiu estus morale aŭ fizikpsike malpli taŭga aŭ detruinda. Li evidente komprenis tion ankoraŭ juna, ĉar li vivis dum unuaj siaj dudek jaroj en tre diferencaj regionoj inter tre diferencaj homoj, sed li tamen vidis la sekvojn de la unua mondmilito kaj poste de la dua kiuj estis eblaj pro la homa kapablo malami diferencajn homojn pro antaŭjuĝoj.




Kiel prui al naciisto aŭ rasisto ke primitiva homo el ĝangalo estas samvalora kun li? Kiel prui al profundkredanto de iu religio ke alireligiulo estas samvalora kiel li? Kiel prui al superredukita erudiciulo ke analfabeto estas samvalora kun li? Nur per klopodo trovi la esencon de la homa animo. Pro tio necesas sufiĉe longe kunvivi kun kanibaloj por kompreni iliajn vivvalorojn, socian sistemon kaj kulturon,

sufiĉe longe vivi kun profunde konvinkitaj religiuloj por kompreni iliajn komprenojn pri la vivo kaj iliajn kulturkonceptojn, sufiĉe longe vivi kun simplaj needukitaj homoj kaj same kun la plej superaj homoj de sociaj elitoj (ekz. ŝtatestroj, universitatoj ktp). Dank al lia malfermiteco, ege granda kuraĝo kaj speciala kapablo proksimiĝi al ĉiu kaj gajni rapide la amikecon de ĉiu, lia vivo estis sukcesega eksperimento. Li trovis kion li serĉis kaj tion li montris en siaj literaturaj verkoj. En ĉiu el ili po iom, sed esence en lia romaneto »Kumeŭaŭa – la filo de ĝangalo« kaj du liaj poemoj: »Mi vizitas mian farmon« kaj »La mondo en ŝiaj manoj«.

Pri la du poemoj ekzistas bonega studo de Zlatoje Martinov kaj Jovan Zarković en revuo REVIJA (Osijek 1989, numero 9). Kaj pri unu el ili ni havos la okazon aŭdi apartan prelegon dum tiu ĉi seminario. Tial mi aparte parolos nur pri »Kumeŭaŭa – la filo de ĝangalo«. Foje mi demandis Tibor: Ĉu la okazaĵoj en la romaneto vere okazis aŭ temas pri verkista fantazio. Li respondis ke preskaŭ ĉio vere okazis sed ne dum unu ekspedicio kaj ne lige al nur unu persono. Sekve la romaneto estas produkto de lia kompreno pri la homa esenco. Legante tiun romanon pri dekdu-jara infano el la plej primitiva kulturo oni ricevas profundan admiron

kaj por tiu knabo kaj por lia kulturo. Per tio la aŭtoro gajnis ĉion kion li povis atingi. La romano estis tradukita al trideko da lingvoj, kio montras ke ĝi estas samentuziasme akceptata de legantoj en kiu ajn monda kulturo kaj la libron ŝatas ĉiuj generacioj: de trijaraj infanoj ĝis la plej maljunaj legantoj. Tiu rezulto, do ke ĉiuj ŝatas la romanon kaj ke ĉiuj entuziasmas pri la enhavo, estas atingita celo. Ĉiuj kiuj tralegos ĉi tiun verketon eksentos tion kion Tibor volis: La neplenkreska homo el primitiva ĝangala kulturo estas superheroo. Ne pro iuj heroaj agoj, sed simple pro siaj kapabloj kaj scioj en por li natura ĉirkaŭaĵo, pro kiuj nur li povis savi grupon da plenkreskuloj.

Tio devas senarmigi ĉiun homon kiu havas antaŭjuĝojn rilate la valorojn de diversaj homgrupoj. Aparte ĝi estas gravega kiel eduklibro por infanoj en la nuna novliberalisma miskoncepto pri valoroj: kiam gravas nur HAVI kaj ne ESTI, kiam gravas konkluri kaj batali




sed ne solidari. La libro montras ke la plej baza, natura homo, netuŝita de »civilizo« havas tute aliajn valorojn. Por li ne gravas HAVI, sed ESTI. Pensu pri ĉapitro en kiu post kiam ili shifiĉe ĉasis li aliris kapreolon kaj karesis ĝin, flustris al ĝi amvortojn kaj al la demando de la aŭtoro: kial li kiel ĉasisto lasis la predon, li diris: Maljuna Maloa diras: »Homo ne rajtas esti malpli bona ol bestoj kaj la bestoj mortigas nur kiam ili malsatas.« Li ne mortigas por akumuli (havi) sed nur kiam li devas (pro malsato) por ESTI.

En ĉapitro pri iniciiĝo de gejunuloj, la ĉefa tasko estas ke grupo da similaĝaj gejunuloj estas sendata for de la vilaĝo por mem sen helpo de plenaĝuloj travivi unu monaton. Tio nepre devigas ilin maksimume solidari kaj agadi kune, organizitaj kaj unu por la alia. Ne estas konkurado kaj bataloj, estas la nura nepra lernejo en kiu ili devas kapabli solidari.

Kio do estas la esenca koncepto de la filozofio de Tibor Sekelj, kiu eliras el tiuj kelkaj liaj verkoj?

Ĝi estas simpla kaj mirinda:

1. Ĉiu homo kiel individuo estas la plej bona en la mondo. Kumeŭaŭa malgraŭ sia infanaĝo kaj analfabeteco estas la plej valora homo de la mondo en sia vivĉirkaŭaĵo, ĉar nur li povis savi la grupon kiu ne kompetentis pri la vivo en tiuj cirkonstancoj. Vi estas la plej bona en la mondo almenaŭ por tiuj homoj en via ĉirkaŭaĵo kiuj bezonas vin. Ili venas peti vin pri iu helpo sciante ke nur vi povas solvi tion. Vi do estas la plej bona kaj valora persono en via vivĉirkaŭaĵo kie vi lernis ĉion pri la maniero travivi kaj kunvivi kun aliaj. Sekve oni ne komparu sin, oni ne komprenu sin kiel mapli bona ol aliaj, oni ne havu minuskomplekson pro timo pri sia malvaloro. Simple, ĉiu unuopulo estas la plej valora.
2. Kiel membroj de grupoj ni ĉiuj kontribuas laŭ niaj scioj kaj kapabloj dum nia limigita vivdaŭro. Mi ne valoras kiel unuopulo, sed nur kiel kontribuanto al grupo(j). Valoras la faroj kaj kreemo. Ne gravas posedi iun maŝinon aŭ domon, gravas kontribui al komuna scio kiel produkti la maŝinon aŭ konstrui la domon, kiel kontribui al la grupvivo kaj al harmonia pluekzisto de la naturo. Individuo ne povas posedi ion ajn. La aero estas de ni ĉiuj, la akvo kie ajn ni estas



apartenas al ni ĉiuj, la manĝfontoj kie ajn ni estas apartenas al ni ĉiuj. Tial la baza, primitiva homo, ĉiam inter siaj valoroj havis la gastamon. Oni ne povas posedi la teron, ĉar ĉiu rajtas marŝi sur ĝi kaj oni ne povas iun ajn posedon kunporti kun si post la morto. Do la nocio de posedo ne estas imanenta al la vivestaĵoj. Grupetoj posedas teritoriojn nur provizore. Tiom longe dum ili vivas sur tiuj. Kaj ili kundividas tiujn provizorajn posedojn kun ĉiuj novvenintoj. Tiu koncepto de la homo kiel parto de kolektivo ne HAVI sed ESTI estas la dua baza elemento de la filozofio de Tibor. Kaj tiu simpla sed tre profunda kompreno estas la heredo kiun Tibor postlasis al ni, estas tio kion li en sia vivo serĉis: la esenco de la homa animo. Tiu animo en kiu la unuopulo estimas sin mem ĉar li estas la plej bona en la mondo kaj tiu animo en kiu li ne gravas pro posedo sed pro sia kontribuo al grupo(j).

Kaj se oni komprenas ekde sia infaneco tiamaniere la esencon de la homo, oni povos estimi ĉiujn homojn kaj kompreni ilin kiel egalaj al si mem.

Tiel Tibor kontribuis al forigo de antaŭjuĝoj kiuj dividas homojn je pli kaj malpli valoraj grupoj, pli kaj malpli respektindaj unuopuloj kaj per tio al pli paca mondo.

Nelaste oni diru ke dum la tuta vivo li arde batalis por la internacia lingvo opiniante ke komuna neŭtrala lingvo estas forta ilo por pliproksimigi la diverslingvanojn kaj ebligi al ili forigi antaŭjuĝajn konfliktojn.

Zlatko Tišljarić

## **AL KIUJ LINGVOJ KAJ KIOM ONI TRADUKAS EN ORGANOJ DE EŬROPA UNIO?**

En la jena dokumento

Chi tie: [http://bookshop.europa.eu/is-bin/INTERSHOP.enfinity/WFS/EU-Bookshop-Site/en\\_GB/-/EUR/ViewPublication-Start?PublicationKey=HC3008600](http://bookshop.europa.eu/is-bin/INTERSHOP.enfinity/WFS/EU-Bookshop-Site/en_GB/-/EUR/ViewPublication-Start?PublicationKey=HC3008600).

Troviĝas interalie la jena teksto:



»En la jaro 2008 tradukis la ĝenerala direktorato por tradukado 1.805.689 paĝojn. Kiel montras la rezulto rilate la elirilingvojn temis pri 72,5% da elirtekstoj en la angla, (inkluzive kun tekstoj neekstintaj en la Eŭropa Komisiono), 11,8% en la franca, 2,7% en la germana kaj 13% en ĉiuj aliaj lingvoj de EU. La plej multaj originalaj tekstoj intertempe estas produktataj en la angla kaj ne plu en la franca.«


Seán Ó Riain

## ESPERANTO PREZENTITA AL HUNGARA PLATFORMO POR EŬROPA INTEGRIGŬO

Okazis kunveno de hungaraj organizoj de la Platformo por la Eŭropa Integriĝo kaj Civila Dialogo. Mi partoprenis en tiu kunsido.

Laŭ la tagordo estis la jenaj temoj:

1. Pensoj pri Eŭropo, pri la Eŭropa Unio; aktualeco de la Platformo (Senĝena interŝanĝo de opinioj)
2. 2013 – Jaro de la Eŭropaj Civitanoj. Kion fari?
3. Jara programo de la Platformo
4. La kunvenon gvidis la direktoro de la Budapeŝta Eŭropo-Domo. En la kunveno estis reprezentitaj 42 diversaj organizoj.
5. Mi kunportis 60 ekzemplerojn da priesperanta informilo.
6. Tuj ĉe la komenco de la diskuto mi alparolis. Citante du punktojn el la celoj de la Platformo mi emfazis la gravecon de la informŝanĝo inter la organizoj. Por subteni mian aserton mi uzis retorikan demandon: „Ĉu iu inter la ĉeestantoj scias pri tio, ke la Eŭropa Esperanto-movado okupiĝas pri uniaj temoj aŭ ne, kaj se jes, pri kiuj, kiel?”. En la respondo de la retorika demando mi diris, ke sur la unia nivelo unuavice aperas Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kvazaŭ super-organizaĵo de la membroŝtataj Esperanto-Asocioj. EEU partoprenis/-as en multaj uniaj aferoj. Ekzemple:



- Partopreno en la prilaboro de la EU Civitansocia Platformo pri Multlingveco,
  - Partopreno en konsulto iniciatita de la Eŭropa Komisiono pri la futuro (2010-2020),
  - Plurfoje aktiva partopreno en la Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica, Pollando,
  - **Eŭropa Civitana Iniciato, jam transdonita** al la Eŭropa Komisiono; pri tio gazetara komunikado estas legebla en nia informilo, trovebla sur la informtabulo,
  - Estos Eŭropa konferenco en Triesto: Kia estus la nuna Eŭropo sen EU?
  - Ankaŭ landa asocio okupiĝis pri Eŭropa temo en Sarajevo en 2010: Eŭropa Unio hieraŭ hodiaŭ morgaŭ. Lingvaj kaj kulturaj aspektoj.
- Post la vicigo de faktoj mi diris: la Hungaria Esperanto-Asocio estas parto de la Eŭropa Esperanto-movado kaj ankaŭ ano en la Platformo. Kiel la Platformo povus

transdoni niajn penadon [aludo al celo de la Platformo], se ĝi ne havas informojn pri ili? Tion povas demandi ankaŭ aliaj organizoj. Por tio ni devas preni grava la efektivigon de la informŝanĝo inter la organizoj, kio postulas organizitecon. Almenaŭ per hejmpaĝo.

Mia alparolo ricevis pozitivajn reagojn. Fine de la diskuto pri la temoj la direktoro de la Eŭropo-Domo diris, ke sekve de mia propono la Platformo havos diskutliston kaj ankaŭ hejmpaĝon.

Mi rimarkis, ke la homoj antaŭ ol foriri ne forprenas informilon de sur la tablo, do mi tuj persone prezentis al ili ĝin. Ĉiu akceptis ĝin kaj dankis. Du sinjorinoj petis pluajn ekzemplerojn. Iu alia diris, ki ŝi iam lernis Esperanton, sed jam forgesis multon. Pluraj menciis, ke en sia loka medio ili konas esperantistojn.





Dum la kunveno ĉeestis ankaŭ estrarano de HEA. Ĉar la partoprenantoj povis/-as ekkoni la gazetaran komunikon pri nia Civitana Iniciato nur post la kunveno, la opiniojn pri ĝi mi povos ricevi nur pli poste. Tamen mi pensas, ke mi povas esti kontenta pri tiu kunveno.

László GADOS

## THE ECONOMIST ENKETIS RETE KIU FREMDLINGVO ESTAS PLEJ LERNINDA

La brita revuo The Economist aperigis retan enketan esploron per sia reta paĝaro Intelligent life.com, kiu fremdlingvo estas la plej utila por britoj. Post kelkmonata enketado la fina rezulto estis tre surpriza por ili:

"La respondo al nia reta voĉdonado estis senprecedenca. Kiam la balotado estis fermita, pli ol 11.000 voĉdonoj estis transdonitaj. La ĉefa surprizo estis, ke la unuan pozicion gajnis kun 26% de la voĉdonoj esperanto – lingvo internacia en kiu homoj de ĉiuj landoj povas konversacii egalrajte. En la dua loko estis brazila portugala kun 16%, tiam la hispana kaj la franca kun 14%, sekvis la ĉina (12%), la latina (5%), la gaela (4%) kaj la araba (2%). Aliaj legantoj sugestis plurajn lingvojn inter kiuj la fikcia (Elfo) ».

Vidu ĉe: <http://moreintelligentlife.com/blog/georgiagrimond/best-language-poll>

Francisco Javier Moleon

## UNUAJ EĤOJ PRI LA POPOLINICIATO RILATE EŬROPAN HIMNON

EEU lanĉis "civitanan proponon", kio eblas ekde la 1a de aprilo (neniu ŝerco), kanti la Eŭropan himnon en Esperanto. Kiel konate, ja ne ekzistas teksto por la himno, nur melodio.

Kaj Umberto Broccatelli kreis tekston en Esperanto, vidu <http://ec.europa.eu>

Gazetaran komunikon vidu ekzemple inter tiuj de GEA (en la Germana):

<http://www.esperanto.de/presse/aktuelles/index.html>

Venis nun unua eĥo en la gazetaro:

[http://www.europeonline-magazine.eu/erste-eu-buergerinitiative-europa-hymne-auf-esperanto\\_202704.html](http://www.europeonline-magazine.eu/erste-eu-buergerinitiative-europa-hymne-auf-esperanto_202704.html)

Tie vi povas postlasi komenton.

Bona ekpaŝo de EEU okaze de la Jubilea Jaro.

Rudolf Fischer



## RAPORTO PRI PARTOPRENO DE PORTUGALA LERNEJA E-GRUPO EN LA 28<sup>a</sup> PSI



Grupo de dek gelernantoj kaj du geinstruistoj el lernejo Braamcamp Freire, en Pontinha, najbare al la ĉefurbo Lisbono, partoprenis la 28-an Printempan Semajnon Internacian.

PSI okazas ĉijare en la germana urbo Bonno kun pli ol cent partoprenintoj (ĉi-jare 120). Multaj eventoj okazis dum la aranĝo laŭ la ĝenerala kaj tradicia skemo: laborprogramo matene, ekskursoj posttagmeze kaj distrajkulturaj eroj vespere. Ni de la komenco nin

pretigis por ne nur ricevi, sed ankaŭ doni ion. De frue ni trejniis iujn kantojn, inkluzive de kelkaj portugalaĵoj esperantigitaj. Ankaŭ ni gvidis atelieron kadre de la laborprogramo. Pro tio ke la ativaĵoj abundis ni rakontu pri tiuj en kiuj ni partoprenis. Tiel ni elektis ene de la matena laborprogramo partoprenon en lernateliero (mazi-kurso) kaj manlaboro, kiu konsistis precipe en ŝtofkolorigado kaj vizaĝpentrado; posttagmeze ni partoprenis en diversaj aktivaĵoj kiel «sinkaŝado en Waldau», vizito al urbo Kolonjo kun eniro en la ĉokolada muzeo, tuttaga ekskurso al urbo Königswinter sur la rivero Rejno, vizito al la gastiganta urbo Bonno kaj piedirado en parko Rheinaue en Bonno. De la distrajkulturaj eroj ni elektis unuope laŭvole, kelkajn kinojn (la sagao Harry Potter superregis), muzikkoncertojn kaj konkursojn. Je la lasta tago dimanĉe iom ŝanĝiĝis la programo, pro tio ke ovoserĉado kaj popoldanco anstataŭis la lernagadon, kaj la adiaŭa festo kunligis ĉiujn. Ne mankis ankaŭ gimnastikado ĉinstila (Qigong) je la sepa kaj duono matene, tuj antaŭ la matenmaĝo, sed malmultaj partoprenis kaj la geknaboj nur unu fojon aŭdacis frue leviĝi.



Mi devas laŭdi la organizantojn kaj la mastrumantojn pro la kvalito kaj kvanto de la programeroj. Ĉiuj gelernantoj multe profitis el la etoso kaj iom progresis esperante, malgraŭ tio, ke ili preskaŭ ĉiam kune tro ofte krokodilis. Sed oni ne povas postuli nekrokodiladon al komencantoj tiaj, kiaj ili, kiuj nur unufoje semanjne kunvenas por lerni Esperanton kaj eĉ la plejparto nur ĉijare komencis. Kvankam malmultaj el ili aŭdacis paroli ili progresis en la afero kompreno. Ekde la

komenca plena dependeco de la instruisto, kiu devis traduki ĉion, ili iĝis iomete memstaraj je la fino. En la estonto eble venos nebridebla deziro aktive partopreni en esperanta movado. Dum la semajno aperis instruistino el Herzberg, la urbo de Esperanto, kune kun tri lernantinoj. Ni ĉiuj bone kunvivis kaj mi ŝin multe demandis pri la mirinda iniciato starigi oficiale Esperanto-urbon. Mi ne perdis oportunon relanĉi ĉe ŝi mian projekton por krei reton de oficiale ĝemeligitaj urboj per Esperanto, laŭ iam prezentita propono (legebla ĉe <http://www.ipernity.com/blog/filipe.luizo/112581>) kaj ni facile konsentis pri tio, ke institucioj kiel EEU devus krei grupon zorgantan pri apogo al la Esperanto-urbo.

Luis Ladeira

## **LA PREZIDANTO KAJ VICPREZIDANTINO DE EEU ĈEFROLIS EN PRINTEMPA MALFERMA TAGO DE UEA**

La 28-an de aprilo Seán Ó Riain havis 40 minutan prelegon pri la 'himna kampanjo' en Eŭropa Unio kaj Flory Witdoeckt kantis la himnon dum la malferma tago de UEA en Rotterdomo. Ili ankaŭ disdonis la broŝuron pri la galiva konferenco kaj anoncis ke tie estos tempo por pridiskuti la tutan poresperantan eŭropan strategion. La publiko subtene rilatis al la iniciato.

Zlatko Tišljár

## **JOZEFO GOLEC, ESPERANTISTO - HONORA CIVITANO DE URBO CIESZYN**

La atribuo de la honor-titolo kaj la ceremonio okazos la 3an de majo 2012 (post la Dua Mondmilito oni aljuĝis nur tri tiajn titolojn, nia samideano estos la kvara !!!) kaj krome danke al streboj de Pola Societo Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL) okaze de 125-jara Jubileo de Esperanto - Prezidento de Pollando jam subskribis la dekreton pri atribuo de ŝtata ordeno: la Oficira Kruco de la Ordeno de Renaskiĝo de Pollando por nia eminenta samideano. Fine de majo 2012 Vojevodo de Pomerio solene dekoros nian kolegon per la ŝtata ordeno.



EDE-PL kreis en Vikipedio E-paĝon pri Jozefo Golec - vidu la suban akroĉitan dokumenton de Vikipedio, legu la gratulojn de Kazimiro Krzyżak senditajn al Jozefo Golec kaj urbestroj de Cieszyn kaj Sopot (Teŝino kaj Sopoto), kaj eniru la suban ligilon al la Tag-Gazeto de Teŝino.

<http://gazetacodzienna.pl/artukul/kultura/jozef-golec-honorowym-obywatelem-cieszyna>

Edward Kozyra

## EKSPOZICIO – ESPERANTO 125 – EN VILNO



Iniciatita de litovaj ĵurnalistoj esperantistoj en vasta vestiblo de la prestiĝa biblioteko de Litova Scienca Akademio ekfunkciis grandapleksa ekspozicio dediĉita al 125-jaro de la Internacia lingvo Esperanto. La 6-an de aprilo okazis solena inaŭguro de la ekspozicio, kiun ĉeestis membroj de akademia socio, scivolaj legantoj kaj reprezentantoj de Vilna esperantistaro Post sonigo de esperantista himno “La Espero” la malfermajn

paroladojn eldiris la direktoro de la biblioteko, konata sciencisto pri historio de litova literaturo, tradukisto el la latina kaj malnova greka lingvoj d-ro Sigitas Narbutas kaj prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, vicprezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio Audrys Antanaitis.



La ekspozicio kiel sian anoncafiŝon utiligis la jubilean bildon de brita esperantisto P.Oliver. Ekspoziciitaj estis ĉefe litovaj publikaĵoj. Multaj lernolibroj, inter ili, la unua porlitova lernolibro de Esperanto (1890), statutoj kaj jarraportoj de la unuaj Vilna kaj Kaŭna E-societoj, eldonaĵoj de la antaŭmilita kaj nuna Litova Esperanto Asocio (LEA). Kompreneble, ankaŭ ties revuoj “Litova Stelo”. Estis ekspoziciitaj kelkaj arkivaĵoj. Ekzemple la responda letero de la Esperantista Interhelpo pri iniciato de LEA aranĝi litovan civitancon al membroj de Zamenhofa familio por savi ilin. En aparta stando estis ekspoziciita materialo pri UEA kaj ties

Universalaj Kongresoj. Kompreneble, estis prezentitaj ankaŭ kelkaj gravaj forpasintaj litovaj esperantistoj, iliaj publikaĵoj.

La ekspozicio en Vilno funkciis unu semajnon, ĝis la 20-a de aprilo.

Valdas Banaitis

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita: la 30-an de aprilo 2012**

**Redaktoro: Zlatko Tišljar**

En la numero kunlaboris: Petras Čeliaskas, Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Javier Moleon, László Gados, Rudolf Fischer, Edward Koryra, Valdas Banaitis.

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

